



BULTENO

de Esperantista Klubo en Praha
Věstník Klubu esperantistů v Praze
pošt. schr. 1069 111 21 Praha 1

N-ro 4/2001 (163)

Prosinec / decembro 2001

Enhavo - obsah:

La mesaĝoj de UN kaj Unesko al la 86-a UK	2
Eli Urbanová ŝatas nian klubon	4
Poemoj de Zdenka Bergrová	7
B. Němcová: Kiel Hanĉjo lernis latinlingve	8
F. Karinthy: Přednáška	10
K. Havlíček-Borovský: Reĝo Lavra	11

Agrablan kaj feliĉan Kristnaskon kaj sanon kaj pacon en la Nova Jaro 2002a

tutkore deziras al vi la komitato de la Esperantista Klubo en Praha

La Zamenhof- kaj Kristnaska Vespero de nia klubo okazos ĵaŭde la 13an de decembro 2001 de la 13a ĝis la 18a horo en nia nova klubejo en la strato Ve Smečkách n-ro 25 (proksime de la Venceslaa placo).

Sub la kristnaska arbeto okazos rememoro pri la vivo kaj verko de la kreinto de Esperanto kaj poste kantado de kristnaskaj kantoj, gustumado de kristnaskaj dolĉaĵoj, kaf-, te- kaj vin-trinkado kaj ĝenerala amuziĝo.

Ĉiuj klubanoj estas sincere invitataj, venu ankaŭ tiuj, kiuj en nia nova klubejo ankoraŭ ne estis.

Nia unua kunveno en la nova jaro 2002a - en kiu nia klubo festos sian centjariĝon - okazos ĵaŭde la 3an de januaro 2002 inter la 13a kaj 18a horo en la klubejo Ve Smečkách 25.

Zamenhofiv a Vánoční večer našeho klubu se koná ve čtvrtek 13. prosince 2001 od 13.00 do 18.00 hod. v klubovně Ve Smečkách č. 25.

Premie OSIEK pro Eli Urbanovou

Jak už bylo uvedeno v minulém čísle našeho věstníku, letošní 14. mezinárodní esperantská konference kulturní organizace OSIEK konaná v červenci ve Strážnici zvolila z pěti návrhů knihou roku autobiografický román naší přední esperantské básnířky a spisovatelky paní Elišky Urbanové „Hetajro dancas“ (Hetéra tančí). Ukázky uveřejňujeme na str. 4 - 6. K udělení ceny blahopřejeme!

La mesaĝo de UN al la 86a Universala Kongreso de Esperanto en Zagrebo

Estas por mi plezuro transdoni miajn bondezirojn al la 86-a Universala Kongreso de Esperanto. La Esperanto-movado ĉiam partoprenis la celon interligi homojn trans naciaj limoj. Hodiaŭ ni vivas en nova epoko de komunikado, en kiu eblas transsendi informojn pli rapide kaj pli foren ol iam ajn antaŭe. Tamen unu homo el du neniam faris aŭ ricevis telefonvokon. Larĝa diĝita disdivido forbaras multajn malriĉajn landojn de la rimedoj de inform-teknologio. Unuiĝintaj Nacioj, kunlabore kun la civila socio kaj la privata sektoro, havas firman volon transponti tiun dividon.

Inter la novaj iniciatoj, pri kiuj mi esperas ke ili konstruos diĝitajn pontojn al la evolu-landoj, estas la Teknologia Servo de UN, UNITEs. Tiu norda reto de volontuloj dividas sian scipovon kun grupo en sudaj landoj, donante trejnadon pri la apliko de teknologio. Plibonigita komunikado havigas multajn avantaĝojn: por distanca lernado, pli rendimenta negocado kaj pli rapida reago al urĝaj okazaĵoj. Dividante la neelĉerpeblan varon informado ni povas plibonigi ĉies aliron al edukado, sano kaj prospero.

Dum ni alstrebas niajn komunajn celojn de plibonigitaj komunikado kaj komprenado, mi antaŭĝojas pri pluaj kunlaboro kaj bonvolo inter UN kaj la E-movado. En tiu spirito mi deziras al vi plenan sukceson.

Kofi Annan, Ĝenerala Sekretario de UN

Poselství OSN 86. světovému kongresu esperanta v Záhřebu

Je mi potěšením předat svá blahopřání 86. světovému kongresu esperanta. Esperantské hnutí se vždycky účastnilo úsilí spojit lidi přes národní hranice. Dnes žijeme v nové epoše komunikace, v které lze předávat informace rychleji a dále než kdykoliv předtím. Nicméně jeden člověk ze dvou nikdy neuskutečnil telefonický hovor. Rozsáhlé digitální rozdělení světa odděluje mnoho chudých zemí od prostředků informační technologie. Spojené národy ve spolupráci s občanskou společností a privátním sektorem mají pevnou vůli překlenout toto rozdělení.

Mezi novými iniciativami, o kterých doufám, že vybudují digitální mosty k rozvojovým zemím, je Technologická služba OSN, UNITEs. Tato severní síť dobrovolníků se dělí o své znalosti se skupinou z jižních zemí a provádí výcvik při aplikaci technologie. Zlepšená komunikace poskytuje mnoho výhod: pro dálkové studium, pro účinnější obchodování a pro rychlejší jednání v náročných případech. Při rozdělování nevyčerpatelného zboží informace můžeme zlepšit přístup všem k výchově, zdraví a prosperitě.

Zatímco se zaměřujeme na své společné cíle zlepšené komunikace a porozumění, těším se na další spolupráci a dobrou vůli mezi OSN a esperantským hnutím. V tomto duchu vám přeji plný úspěch.

Kofi Annan, generální tajemník OSN

La mesaĝo de Unesko al la Universala Kongreso de Esperanto

Estas mia plezuro transdoni miajn bondezirojn al la partoprenantoj de la 86-a Universala Kongreso de Esperanto en Zagrebo (Kroatio) pri la temo „Kulturo de Dialogo - Dialogo inter Kulturoj“.

Unesko aparte zorgas pri tiu ĉi temo: unue, rilate sian mandaton antaŭenigi kulturon de paco, kaj, due kaj pli aktuale en la nuna jaro, en la kadro de la jaro de Unuiĝintaj Nacioj pri Dialogo inter Civilizoj. La fakto ke la Universala Kongreso de Esperanto sin dediĉas al tiu ĉi jaro de Unuiĝintaj Nacioj estas aparte signifa al Unesko. Neregistaraj organizaĵoj kiel la via ludas gravan rolon en antaŭenigo de la celoj kaj strebadoj de Unuiĝintaj Nacioj, kaj Unesko alte taksas siajn jam longdaŭrajn rilatojn kun Universala Esperanto-Asocio.

Lingvoj kaj lingva diverseco konsistigas la ŝlosilon al interkultura dialogo. Ĉar estas la lingvo mem kiu esprimas la komunan historion de kulturo kaj ebligas al ĝiaj membroj komunikiĝi inter si. Je sama tempo, estas la lingvo kiu povigas kulturojn interŝanĝi ideojn kaj prunti kaj adaptiĝi inter si. Same, estas la lingvo, kiu permesas al ni komunĉe dividi niajn ideojn pri la mondo sur tereno de kultura diverseco, kaj malsami dum ni samtempe festas nian komunan homecon. Fine estas per parolado kaj aŭskultado unu al alia ke ni atingas kompreniĝon, tiel esencan al paca kunekzistado.

La laboro de Unesko en edukado, komunikado kaj kulturo daŭre emfazas la gravecon de multlingvismo kaj de konservado de lingva diverseco sur la tutmondiĝanta terĝlobo. Tamen, ni

rekonas ke tia diverseco neniam estu uzata kiel preteksto por perforto aŭ konflikto. Jen nia defio. Ni komune dividas tiun defion kun niaj kunlaborantoj tra la mondo, kiel ekzemple vi, kiuj dediĉas vin al la celoj de la Dialogo inter Civilizoj.

En tiu ĉi kadro, ni alte taksas la laboron de la Universala Kongreso de Esperanto, ĉar vi antaŭenigas lingvon kiu estas ilo de dialogo inter civilizoj, kiu ne fiksas siajn radikojn en la kulturo aŭ intelekta tradicio de difinita grupo de nacioj.

Mi deziras al la kongreso ĉian sukceson.

John Daniel
Asista Ĝenerala Direktoro por Edukado

Poselství UNESCO světovému kongresu esperanta

Mám potěšení předat svá blahopřání účastníkům 86. světového kongresu esperanta v Záhřebu (Chorvatsko) na téma „Kultura dialogu - dialog mezi kulturami“.

UNESCO obzvláště pečuje o toto téma: předně ve vztahu ke svému mandátu upřednostňovat kulturu míru a za druhé a aktuálněji v letošním roce, v rámci roku Spojených národů pro dialog mezi civilizacemi. Fakt, že světový kongres esperanta se věnuje tomuto roku Spojených národů je obzvláště významný pro UNESCO. Nevládní organizace jako vaše hrají důležitou roli v protlačování cílů a snah Spojených národů, a UNESCO vysoce oceňuje své již dlouholeté vztahy se Světovým svazem esperantistů.

Jazyky a jazyková rozmanitost tvoří klíč k dialogu mezi kulturami. Protože je to jazyk sám, který vyjadřuje společnou historii kultury a umožňuje svým příslušníkům komunikovat mezi sebou. Zároveň je to jazyk, který umožňuje kulturám vyměňovat myšlenky a půjčovat si a přizpůsobovat se "navzájem. Stejně tak je to jazyk, který nám dovoluje společně se dělit o své myšlenky o světě na půdě kulturní různosti, a být různými když současně oslavujeme svoje společné lidství. Konečně když mluvíme a nasloucháme jeden druhému, dosahujeme porozumění, tak podstatného pro mírové soužití.

Práce UNESCO ve výchově, komunikaci a kultuře trvale zdůrazňuje důležitost mnohojazyčnosti a zachování jazykové různosti na globalizující se zeměkouli. Avšak uznáváme, že takováto různost nikdy nesmí být použita jako záminka pro násilí nebo konflikt. To je naše výzva. Společně se podělíme o tuto výzvu s našimi spolupracovníky ve světě, jako například svými, kteří se věnujete cílům dialogu mezi civilizacemi.

V tomto rámci vysoce oceňujeme práci světového kongresu esperanta, protože prosazujete jazyk, který je nástrojem dialogu mezi civilizacemi, který nezapustil své kořeny v kultuře a intelektuální tradici určité skupiny národů.

Přeji kongresu všestranný úspěch.

John Daniel
asistující generální ředitel pro výchovu

Vyjde „Kantato“ věry Ludíkové

Už v minulém čísle jsme uvedli, že nová básnická sbírka paní Věry Ludíkové „Kantáta“ už byla přeložena do několika jazyků, též do esperanta Jar. Mrázem. A s potěšením můžeme oznámit, že esperantský překlad vyjde na jaře r. 2002.

Rovněž sbírka básní paní Zdenky Bergrové „Slova noci“ je připravena do tisku (překlad Jar. Mráz a Mir. Malovec, ukázka na str. 7).

V letošním sedmém ročníku soutěže literárního klubu Pegas v Mělníku - v kategorii D pro profesionály - Zdenka Bergrová obdržela 2. cenu. Blahopřejeme!

O místě konání 89. světového kongresu esperantistů zatím ještě nerozhodnuto.

Letošní 86. světový kongres esperantistů byl uspořádán v Záhřebu, předcházející 85. kongres se konal v r. 2000 v Tel-Avivu.

Příští 87. kongres se bude konat v r. 2002 v Brazílii v městě Fortaleza, 88. kongres v r. 2003 bude ve švédském Goteborgu.

O pořádání 89. kongresu v r. 2004 se ucházejí litevský Vilnius a čínský Peking. Vzhledem k tomu, že v posledních letech se světové esperantské kongresy konají střídavě v Evropě a mimo Evropu, je velice pravděpodobné, že 89. světový kongres bude v Pekingu.

Eli Urbanová ŝatas nian klubon

Vivu Rosseti! Kaj Auld!

Tian mi havas feliĉon, karaj, oraj! Mi venas la unuan fojon en la klubon kaj kiu tie parolas, se ne Reto Rosseti! Li vizitis Pragon kune kun sia sinjorino edzino Karola. Rava paro! Ne volu, ke mi konsciuj plenajn signifojn de ĉi renkonto. Komprenu, mi estis komencanta esperantisto. Mi sidis fone kaj ĝojis, ke neniu priatentas min, ke mi ne devas konversi. Kiel mi povis scii, ke jam post du jaroj mi ekrampos sur la Pamason kaj ke estos li, Rosseti, kiu aprobas la eldonon de mia kolekto *Nur tri kolorojn* kaj ke post pluaj dudek kvin jaroj estos ree li, kiu proponas min ano de la Akademio de Esperanto...

Tiun vesperon mi ekkonas ankoraŭ unu faman briton: la skoton William Auld. Rosseti recitas lian poemon Ebrio. Jen kion estas eble verki rekte en Esperanto! La drinkemulon allogas boteloj sur la breto. Ili staras bele en la vico plenaj de bongustaj likvoroj... Subite li ekregistras ian virinon. Ankaŭ ŝi altiras lin. Li emus ŝin tuŝi kaj forgesi ĉion. Li emus - li estas tiom senkapabla, ke li balanciĝas kaj la lango lin tute ne obeas... Profesia aktoro ne prezentus tion pli bone. Vivu Rosseti! Vivu Auld! Mi aplaŭdas tiel potence kaj vere, ke doloras al mi la manoj...

Por ke Kynĉl gapu

Kiel oni diras, kiu volas bruligi, tiu mem devas bruli. Kaj Kynĉl brulis kaj bruligis. Malgraŭ tio, ke li estis floristo kaj lia ekspliko estis plie amika babilo ol funda instruo. Kio al mi profesia instruistino devus obstakli, sed kio al mi neniel obstaklis. Ĉar ankaŭ tio gravas, ke la lernantoj ekridu, ke aktiviĝu eĉ tiuj plej timemaj, eble ĝuste dum bela kantaĵo, ke ili fine disiru en bona humoro kaj kun firma intenco ree veni... Propre ankaŭ tial mi estis tiel diligenta por fari ĝojon al Kynĉl. Por surprizi lin per miaj scioj. Por ke li gapu!

Do nek la angla, nek la franca, kiel mi planis origine, sed la internacia lingvo Esperanto. Esperanto, Esperanto, tiu akcento sur la antaŭlasta silabo al mi plaĉas. La arbo, la ŝipo, la suno, lalala - jam mi komprenas, oni distingas sole la genron naturan. La substantivo finiĝas je -o, la adjektivo je -a, la adverbo je -e... Esperanto havas nur du kazojn, la unuan kaj la kvaran. Klare. En alia kazo mi simple uzos konvenan prepozicion. Ekzemple: sen amiko. Kaj la verbo en Esperanto ne ŝanĝas sian formon laŭ la persono kaj nombro, sekve mi portas, vi portas... Sed pleje min en la tuta afero logas tiu belsoneco... Ĝi sonas ja kiel la itala...

Mi ne ŝatas teatron

Kaj ŝi estas tie ĉi. Ja Suchardová. Virino, kiu min jam pli longe maltrankviligas. Ŝi havas en si ion - ion nedifineblan. Ion, kio min incitas, sed samtempe fascinas. Nun ŝi parolas kun Ŝustr. Nun kun Bárachová. Nun kun Mařík. Nun haltigas ŝin Lorenc kaj ŝi sin enskribas en la prezenc-liston. En la lasta tempo ŝi vizitadas la klubon regule. Kaj kurioze. La atmosfero estas tuj plena de streĉo. Kvazaŭ la niulon trafluus elektra kurento.

Atendi, ĝis kiam ŝi bonvolos, tio daŭras. Pasintfoje mi staris kelkajn paŝojn disde ŝi, ĉu vi pensas, ke ŝi ekregistris min? Ŝi parolis ĉiam plu kaj min superrigardis kiel regionon. Ŝi ne devus tiun sian modelan Esperanton tiel ekspozicii. Ŝi ne estas sur la podio. Entute ŝi al mi ŝajnas terure afekta. Kion vi volas, ŝi estas aktorino. Ŝi ludas, eĉ kiam ŝi ne ludas.

- Mi salutas vin, Eli!.. Kynĉl estas mia homo. Memkomprene, ke li min al Suchardová prezentos. Mi estas lia fanfaraĵo. Mi estis lia plej sukcesa lernantino.

Ŝi ekrigardis min trans la ŝultron kaj donis al mi la manon, kvazaŭ tio ĝenus, sed kion fari, kaj ekdeklamis per tono, kiun oni ne forgesas: Suchardová... Nekredeble! Ĉu ŝi ne scias, kiu mi estas, ke mi verkas poemajn? Ne, mi ne ŝatas teatron. Mi ŝatas filmon.

Suchardová... La klubo jam finiĝis kaj mi estas survoje hejmen, sed mi ĝis nun vidas ŝian subtaksan rigardon, tion, kiamaniere ŝi donis al mi la manon, kvazaŭ ŝi farus al mi ian gracon, kaj

mi aŭdas ŝian aplomban: Suchardová...

Bone, ke Ŝtefo ankoraŭ ne dormas. Mi penas tion al li interpreti: Suchardová... Suchardová... Kvazaŭ ŝi dirus: Reĝino el Sabenujo...

Ŝtefon Suchardová ne interesas. Ŝia recitado lin neniel entuziasmigis. Laŭdire „tia amatorino“...

Deca poemo

Imagu tiun hazardon - mi ascendas en la tramon kaj kiun mi vidas - la aktorinon Suchardová! Kvazaŭ renkontiĝus du katinoj. Mi frapis sin per la piedeto kiel la unua: Kio nova? Nenio. Por la poemo En arbaro mi gajnis la duan premion en Oslo... Poste min per la piedeto frapis ŝi: Deca poemo!... Ĉiu alia al mi gratulus, ekridetus... Mi tamen sentis silentan satisfakcion...

Hejme mi ekfoliumis en la revuo Esperanto por legi al mi eble la dekan fojon ĉi tiun alineon: „En la duarange premiita poemo de la ĉeĥino Eli Urbanová „En arbaro“ la juĝantoj ŝatis samtempe la pitoreskan pentron de la vivo de arbaro, la diskretan humuron pri la eteco de homo en la naturo, kaj precipe la tre lertan formon, neatenditajn rimojn, internajn aliteraciojn, kaj la esceptan kvaliton de la klara, konciza, vortofeliĉa lingvaĵo“ Deca poemo! Pfa!

Paĉjo estus kontenta. Ja li ĉiam akcentas, ke mi ne skribu nur pri amo, ke mi skribu pri la naturo ĉirkaŭe. Kvazaŭ amo ne estus peco da naturo! Kvazaŭ ĝi ne estus mem la esenco de la vivo! Aĥ, mia kara paĉjo! Li ne negas en si ĝardenulon! Kiel modele li zorgas pri siaj arboj! Kaj kiel li fieras, kiam iu el la preterpasantoj al li laŭdas la bedon antaŭ niaj fenestroj! Ankaŭ kiam ekfloras floksoj kaj rozoj, ilia ebriiga bonodoro sin portas ĝis en la ĉambron! Aĥ, mia kara paĉjo! Kiel fuĝaj, kiel modestaj estas liaj ĝojoj!

La poemon *En arbaro* mi al li tradukos, sed kiel li akceptos ĉi tiun? Mi nomis ĝin *Irante ĉirkaŭ bazaro*: - Vi ĉiuj mirus mian guston, / ĉar stranga aĵ' min ree tiras. / Rompu la manojn, faru krucon, / al mi la bildo multe diras! / Jen koridor'... Jen ŝi.. Ŝi gardas / tenante supre la kandelon. / Tamen sen timo ŝi rigardas, / ne kaŝas al li sian belon.../ Knabin' kaj viro. Sperta viro. / Kia kontrasto - barb' kaj mamoo! / Turmenta estas la sopiro. / Turmenta, ho ve, estas amo... / Vi laŭte sakrus. Vi forkraĉus. / Jam perdis mi ĉe vi estimon. / Se tiu bild' al mi nur plaĉus! / Mian ekmovis ĝi animon.

Kaj panjo, kiel tiu min pelus, tiu baldaŭ al mi pritondus la flugilojn. Ja estus senĉese: Kion vi el tiu Esperanto havas, nenion, ne lumigu, ŝparu, tion ĉi ne surprenu, kion dirus la najbaroj - en Ĉaslav, tie mi estus ankoraŭ pli kompatinda...

Eble mi povus observi kuniklojn. Mi ellasus ilin en la korton, en la liberon... Kun ili mi min sentadis bone! Pli bone ol kun falsaj kamaradinoj! Tiu ilia petolado! Tiuj iliaj pacemaj okuloj, kiujn ili dolĉe duonfermadis, kiam io gustis al ili! Kaj ĉefe tiu ilia ekzempla toleremo! Ili trankvile kuŝigis sin unu trans la alian kaj por tiu ripozanta sube tio neniel gravis! Kaj ĉiuj estis de la sama sango, ĉiujn naskis la avida, neoldiĝanta femalo, kiun ŝancelis, apenaŭ al ĝi iu orelo alproksimiĝis. Kaj estis al ĝi egale, ke ĝin amindumas filo aŭ nepo, tiel ĝi estis seksema. Iam ĝi kanajlo subrastis la barilon kaj forkuris al ni en boskon, sed denove pente revenis, hundo ne povis esti pli fidela... Kiam mi rememoras ĝian tragedian finon, mi sentas min diverse. Mizerulino! Ĝi dronis en sterkakvo...

Kaj ree iras al mi tra la kapo Suchardová. Kial mi ŝin agnoskas kaj ŝi min ne? Kial tiu ŝia rezervemo? Ja per tio, ke mi legas en la klubo miajn poemojn, mi al ŝi ne obstaklas. Ĉu ŝi ne komprenas, ke mi bezonas kontakton kun la legantoj? Cetere ankaŭ ŝi miksiĝas al mi en la metion. Mi petas, ŝi verku, montru, kion ŝi scipovas! Min tio ne konfuzas. Suchardová ne estas poeto. Kiel mi tion al vi klarigus? Poeto havas la koron sur la polmo. Poeto estas molulo. Sed Suchardová estas tipe dura karaktero. Mi dezirus al vi vidi ŝin. Ŝi bruligas al si cigaredon kaj metas fulmojn per tiuj siaj sagacaj okuloj. Antaŭ Suchardová ĉiu falas sur la postajojn. Krom Ŝtefo! Krom Ŝtefo! Kiel oni diras „falĉilo frapis sur ŝtonon“. Sed mi ne konsentas kun li. Suchardová estas artistino. Kiel deklamantino ŝi ne havas en nia Esperanto-movado konkurencon. Poste penu similajn homojn grupigi. Unu estas pli granda suvereno ol la alia. Deca poemo! Kvazaŭ ŝi superkompetenta pensas pri tio la sian...

(Daŭrigota)

Eva Seemannová

Jam baldaŭ pasos du jaroj de la 21a de januaro 1999, kiam forlasis nin Eva Seemannová -Suchardová, membrino de nia klubo, honora membro de UEA kaj de ĈEA. Profesie ŝi estis ĉeĥa aktorino kaj ŝi aktoris ankaŭ en Esperanto; ŝi estis Esperanta poetino kaj tradukantino de teatraĵoj, kiujn prezentis la E-a teatra trupo Verda Ĉaro de Julio Baghy. Nun ni rememorigas ŝin per poemo de Jiří Karen.

Jiří Karen

Epiloge al Eva Seemanová

Suno musline klara
paŝon post paŝo subiras
Niaj deziroj al folioj similas
Neĝan teron kaj tamen
helan mondon vidi ni aspiras

Al amantoj mi deziras la sunlumon
freŝan aeron por polmoj
fulmotondrojn al nebulo
al vermoj sekuran truon
niaj aŭtoj bonodoru
kiel herbejaj floroj

Kaj vi - mi deziras laste -
venu min viziti senprokraste
al malsanulej' por diri al mi
almenaŭ unu el afablaj vortoj
kiujn centkvante kaj vante
eĉ milde multaj diros

pli frue antaŭ
mia entombigo

Ĉestmír Vidman 80-jara

Membro de nia klubo, la ĉeĥa kaj esperanta poeto Ĉestmír Vidman, fariĝis 80-jara la 31an de oktobro 2001. Unu tagon pli frue solena posttagmezo je lia honoro okazis en la kulturdomo Vltavská en la kadro de „Klubo de la aktiva maljunaĝo“. Oni prezentis tie la vivon kaj la verkaron de la jubileulo kaj liajn poemojn prezentis Gabriela Vránová kaj Rudolf Pellar. La tutan programon estris d-ro Jan Pixa.

El la verkaro de Ĉ. Vidman ni prezentas du liajn poemojn el la kolekto „Hra zvaná život“ (Ludo nomata vivo) en traduko de J. Mráz.

Humoro

Tempo subite malaperis
Ĉu mateno estas? Ĉu vespero?
Ĉu horo antaŭ tagmezo?

Balono pli leĝera ol aero
salute svingas al mi
super la fervojo

Vekiĝo
La plimalpezigo
ne revenos plu

Sen kompatato

Ĉu vi kuratingos la tempon
de rigidaj flugiloj?
Sur la piedestalo de eonoj
la statuoj ŝtoniĝis

Estu
Ne plifaciligi
penon pri vortoj

Per kirurgia sekco
sen kompatato
ĝis la radikoj

Poemoj de Zdenka Bergrová

La ĉeĥa poetino Zdenka Bergrová estas favoranto de Esperanto. Jam aperis dulingva volumeto de ŝiaj poemoj „*Oscilad de steloj/Chvění hvězd*“ tradukita de Jar. Mráz kaj Mir. Malovec kaj estas jam preta la kompleta traduko de ŝia poemaro „*Vortoj de nokto*“. Jen specimenoj el ŝia poezio.

Kvetoucí forzytie říká,
zem ještě žije,
a střemcha vonící
vyhnala vánici
Honem se fintí směšně
bělobou také třešně.
Co je pak za fušku,
být bělejší pro hrušku.
Taková je to mela,
že jabloň zružověla.
V růžovém na koně
sedly i broskvoně.
Švestka už na to kašle,
že zas má bílé mašle.
Hlavně že do pentlí
v pozemském předpekli
přece jen vykvetly.

Floranta forsitio diras:
vivas ter-medio,
per bonodor' padus'
ŝstormon forpelis ĵus.
Paradas jam rapide
ankaŭ ĉerizoj ride.
Ne facilas aspir'
esti blanka por pir'.
Por pomuj' estas tumulte,
ke ĝi rozkoloras multe.
En rozkoloro tuj
aperis persikuj'.
Egale al prunujo estas,
ke al ĝi blanka banto restas
Ĉefe ke al bant' sur ter'
en la antaŭinfer'
ili ekfloris kun fier'.

Co zrno v zemi překonává,
než klíček vyrazí.
Taková je to síla dravá,
že nedbá nesnází.

Antaŭ ol ĝermo sin elpuŝas,
superas multon grajn',
kiam ĝi sub la tero kuŝas,
kaj ĝenon kiun ajn.

Na vodě stopa. Kolísavá
do širá jako obloha.
Co se tu pevným bodem stává,
proměnou vrdlouhá.

Sur akvo spuro. Ĝi varias
ĝisvasten kiel la ĉiel'.
Kaj firma punkto iluzias,
mensogas pro ŝancel'.

Jak uchopit, když ledakterý
ji hlásá, pak už není ta -
pravda se mívá všemi směry,
ale je vždy trnitá.

La ver'. Se iu ĝin preferas,
ĝi ja ne estas tia jam -
ĉiudirekte ĝi aperas,
sed ĉiam nur kun dorno-kvant'.

Mezi nejvíce prodávané knihy na letošním světovém kongresu esperantistů v Záhřebu patřily dvě „tlusté“ knihy, věnované významným esperantským pracovníkům, a to **Eseoj memore al Ivo Lapenna** (Eseje na paměť Iva Lapenny) - kniha věnovaná někdejšímu významnému pracovníkovi v esperantském hnutí, dlouholetému předsedovi Universala Esperanto-Asocio. Na 418 stranách (a s céděčkem) obsahuje 47 statí 29 autorů. Vyšla v Dánsku.

Studoj pri interlingvistiko / Studien zur Interlinguistik (Interlingvistické studie) - kniha vydaná na počest šedesátin dr. Detleva Blanka, předního německého esperantologa a interlingvisty. Na 700 stranách přináší studie 43 autorů z různých oblastí interlingvistiky, vědy o plánových jazycích. Texty jsou v esperantu a v jiných jazycích s esperantským resumé a vydalo ji nakladatelství KAVA-PECH v Dobřichovicích.

Zájem byl i o publikace s tematikou pronásledování Židů za druhé světové války:

Již 2. vydání úspěšného díla maďarského esperantského autora Tivadara Sorose (mimořádně, jeho syn je známým světovým finančníkem) „**Maskerado ĉirkaŭ la morto. Nazimondo en Hungarujo**“ (Maškaráda kolem smrti. Nacistický svět v Maďarsku) líčí hon na Židy v Budapešti v posledním roce 2. světové války a úsilí autora zachránit svou rodinu. Kniha vyšla i anglicky v překladu Humphreyho Tonkina.

Překlad ze švédštiny „**Kaoso en Budapeŝto**“ (Chaos v Budapešti, autorka Nina Langletová, překlad Kalle Kniivilá) - vypráví o esperantistovi Valdemaru Langletovi (1872 -1960), pracovníku Švédského Červeného kříže v Budapešti. V r. 1944 pomohl zachránit tisíce Židů a jiných pronásledovaných tím, že Švédský Červený kříž vydával pronásledovaným ochranné doklady (tzv. ochranné dopisy).

Božena Němcová

Kiel Hanĉjo lernis latinlingve

„Paĉjo,“ diris Hanĉjo iun tagon, „mi ne plu volas esti tia simpla homo, mi volas esti sinjoro.“

„Pri volo ne temas, ankaŭ mi konsentus, se iu farus el mi grandan sinjoron; sed ĉu vi scias, Hanĉjo, ke sinjoro devas scipovi latinlingve?“

„Nu kion pri la latino; mi iros en la mondon kaj ellernos la latinon sufiĉe rapide.“

„Se vi opinias, ke ĝi estas tiel facila afero, iru do kaj provu.“

Hanĉjo prenis en siajn poŝojn knedaĵojn kaj iris en la mondon lerni la latinon. Li ne imagis la mondon tiel tro terura, tial kun emo li paŝis rekte post la nazo. Ĉar li neniam estis pli malproksime ol post la kampo, li nemal multe miris, kiam li sur la unuan monteton supreniris kaj antaŭ si vidis pecon da lando, kiun li eĉ ne povis tuj ĉirkaŭrigardi.

„Ho, ha!“ li ekkriis kaj klakfrapis la manojn, „tio estas granda mondo, kiam mi trairos ĝin!“ Li do iris plu en la grandan mondon kaj kiam ajn li renkontis iun sinjoron, li atentis, kion li diras, ĉar li opiniis, ke ĝi estas latinlingve. Unue li vidis sinjoron, kiu staris sur taluso kaj al iu diris: „Tino ronda!“ La du vortojn Hanĉjo ekaŭdis kaj tuj ilin dekfoje ripetis, por ne forgesi ilin. Li iris pluen kaj vidis denove sinjoron, kiu el fenestro rigardis, sub la fenestro staris knabo, rigardis birdon ĉe flako kaj vokis: „Birdo trinkas!“ - „Tino ronda - birdo trinkas,“ ripetis al si Hanĉjo irante pluen. „Mi jam scias kvar latinajn vortojn, kaj pli frue ol mi esperas, estos el mi sinjoro.“ Cent paŝojn plue staris denove sinjoro kaj montris al stalservisto ĉaron, dirante: „Jen la ĉaro.“ „Tino ronda - birdo trinkas - jen la ĉaro,“ ripetis al si Hanĉjo, kaj kiam li tion bone sciis, li saltetis pro ĝojo kaj diris al si mem: „Mi ne scias, kion la paĉjo pensis; la latina lingvo ja estas kvazaŭ ludo kaj baldaŭ mi scipovas latine kiel ĉeĥe.“

Li trairis denove eble ducent paŝojn kaj la vojo kondukis lin preter ĝardeno, kie ĝardenisto estis ĝuste ŝpatanta. Jen venis sinjoro en la ĝardenon kaj kolerplene vokis: „Li nur pikas!“

„Tino ronda - birdo trinkas - jen la ĉaro - li nur pikas,“ diris al si Hanĉjo kaj paŝis pluen. Sed subite li haltis, pripensis kaj diris: „Por kio mi lemus tiom da latino, nia sinjoro instruisto scipovas neniom pli, kaj tamen li estas sinjoro. Se mi devus ankoraŭ pli multe memori, mi forgesus unu pro alia kaj miaj pensoj povus implikiĝi.“

Post tiu ĉi saĝa rezono Hanĉjo turnis sin sur kalkanumo kaj kuris hejmen, kvazaŭ oni pelĉasus lin.

„Ni rigardu, Hanĉjo jam revenis,“ miris la paĉjo, kiam li vidis lin en la pordon eniri.

„Nu, kiel vi scipovas latine?“

„Tino ronda, birdo trinkas,“ respondis per serioza voĉo Hanĉjo, kiu firme decidiĝis ne paroli alimaniere ol latinlingve.

„Kion vi parolaĉas, tion diablo komprenu,“ grumblis la paĉjo kaj Hanĉjon ne plu atentis.

Sed la panjo ne estis trankvila, do post momento ŝi demandis: „Sed kie vi, knabo, preskaŭ tutan tagon vagis?“

„Jen la ĉaro, li nur pikas,“ responde aŭdigis sin Hanĉjo.

„Ĉu io estas incitita en via kapo, ke vi tiel respondas?“ koleris la panjo, sed Hanĉjo ekis ekde la komenco sian latinan kanton, kaj demandu kiu ajn ion ajn, nenion alian li respondis, nur „tino ronda - birdo trinkas - jen la ĉaro - li nur pikas.“ Kaj ĉar li tion diris tre rapide, neniu komprenis, kion tio propre signifas.

„Kampulo,“ diras la panjo post kelkaj tagoj al sia edzo, „en la kapo de nia knabo ekflagris deliro, li babilaĉas kaj ne scias kion; mi devis la maljunan paŝtiston demandi, kion fari. Mi jam scias.“

„Nu, kaj kion?“

„Li konsilis al mi, ke ni de supre kaj subite malvarman akvon sur lian kapon verŝu, ke la delirado tuj pasos.“

„Tion ni povas tuj provi, li sidas ekstere sub la stalo tute enpenŝiginta. Iru, prenu sitelon da malvarma akvo, supreniru sur la stalon kaj tra la falpordo verŝu ĝin sur lin. Ni tuj ekvidos, ĉu tio helpas.“

La panjo prenis sitelon da akvo, ascendis sur la stalon kaj en la momento ŝi renversis ĝin sur la enpenŝigitan latiniston.

Tiu elsaltis, mankaptis sian kapon kaj kriis, kiom lia gorĝo kapablis: „Panjo, paĉjo, helpu, mia kapo!“ La paĉjo venis, kaj kvazaŭ pri nenio sciis, li miris: „Kia plago, kio okazis al vi?“

„Mi sidis kaj ripetis la latinon, sed subite kvazaŭ la ĉielo disŝiriĝus kaj min mortigi volus,“ lamentis Hanĉjo. „Mi ja pensis, ke vi ĉeĥlingve paroli forgesis, kaj vidu, ĝi bone fluas el via buŝo,“ ekridis la paĉjo.

„Vere, pro ektimo mi ja forgesis la latinon.“

„Dio mem ellavis ĝin el via kapo, ĉar vi devas esti konstanta honesta Hanĉjo, kaj ne grandsinjora frenezulo. Memoru tion!“

Post tiuj vortoj la paĉjo turnis sin, iris al la panjo kaj diris: „Li jam estas resaniĝinta, kaj dio donos, ke la deliro ne plu venos al li.“

La paĉjo diris veron. Ekde tiu tempo Hanĉjo parolis klare kaj eĉ ne volis plu lerni latine.

Tradukis Jiří Patera

Pražskými ulicemi...

Na Barrandově je řada ulic pojmenovaná po významných českých hercích. Mezi nimi je i ulice Högerova.

Karel Höger (1909 - 1977) byl vynikající český divadelní, filmový, televizní i rozhlasový umělec, kterého naši veřejnosti není ani nutné zvláště představovat.

Málokdo však ví, že Karel Höger znal esperanto a působil v esperantských pořadech Československého rozhlasu. Ředitelem rozhlasové stanice v Brně byl esperantista ing. Antonín Slavík a jeho zásluhou začala brněnská rozhlasová stanice vysílat v esperantu pravidelné přednášky o české kultuře, o našich významných osobnostech, o krásách naší vlasti apod. A ředitel Slavík chystal větší věci, umělecká pásma a rozhlasové hry v esperantu. Protože bylo jasné, že v takovýchto pořadech mohou účinkovat pouze školení profesionální herci, byl v r. 1932 uspořádán kurs esperanta pro herce Zemského divadla. Mezi nimi byli Karel Höger, Zdenka Švabíková-Kožíková, František Šlégr, Ant. Klimeš, Vladimír Leraus, Václav Šindler (známý jako Jozefek Melhoba), Jarmila Kurandová a další, a také pracovníci rozhlasu, spisovatelé a režiséři Dalibor

Chalupa, Frant. Kožík a Josef Bezdíček. A v následujících letech byly vysílány esperantské umělecké pořady, jako pásma poezie, zábavné kabarety i rozhlasové hry, např. RUR a Bílá nemoc Karla Čapka, Grandhotel Nevada a Jízdní hlídka Fr. Langra, operety Na růžích ustláno Jar. Weinbergra a Polská krev O. Nedbala a opery Hubička a Prodaná nevěsta. Tyto opery nebyly vysílány celé, pouze vybrané árie spojené mluveným slovem. Árie v esperantu zpívali přední brněnští operní pěvci, spojovací text četl obvykle Karel Höger.

Po válce byly esperantské umělecké pořady vysílány z Prahy, kam přešla i část brněnských herců, mezi nimi i Karel Höger. V letech 1948-1950 byly vysílány hry *Strašidlo na zámku* M. Šrámka, *Letní obloha* Z. Jirotky, *Nejmenší stopa* Ed. Fikara, *Pohádka máje* V. Mrštika (K. Höger hrál Ríšu) a také opery v novém překladu T. Pumpra: *V studni* V. Blodka, *Prodaná nevěsta* B. Smetany a *Rusalka* A. Dvořáka. Spojovací texty opět četl Karel Höger.

Avšak koncem roku 1950 bylo na příkaz stranického vedení vysílání esperantských pořadů Čs. rozhlasu zastaveno (a dodnes neobnoveno!). Esperantské pořady v rozhlase skončily, skončily honoráře a skončil i zájem národního umělce o esperanto. -jpa

Bude páter Schleyer blahorečen?

Německý kněz Bernhard Eichkorn z diecéze Freiburg podal návrh tamnímu arcibiskupovi Oskaru Saierovi, aby byli blahorečeni dva diecézní kněží: Max Josef Metzger (1887 - 1944), sociální reformátor a esperantista, popravený nacisty, a Johann Martin Schleyer (1831 - 1912), autor jazyka volapük, předchůdce esperanta. Byl vytvořen mezinárodní výbor pro blahorečení pátera Schleyera, který organizuje podpisovou kampaň (adresa: Reinhard Haupenthal, BP 19, FR-84340 Malaucène, Francie).

F r i g y e s K a r i n t h y

Přednáška

Postihla mě zvláštní pocta. V posledních dnech se setkali v Budapešti esperantisté ze všech částí světa: Němci, Švédové, Australané, dokonce i Číňan byl mezi těmi, jež spojil společný pomocný jazyk, ten šťastný pocit, že mohou volně a nezávisle spolu rozmlouvat bez toho, že by jejich projev urazil národní cítění druhého člověka.

Několik mých knih, které vyšly esperantsky, mě oprávnilo připojit se k nim. Přijali mě roztomile a maďarští organizátoři mne poctili prosbou, abych se zúčastnil koncertu, který bude večer uspořádán v intimní klubovně pro rozptýlení mezinárodní společnosti.

Potom, když už jsem byl přítomen, někoho napadlo, abych přednesl jednu ze svých novel.

Pochopitelně v esperantském překladu, který napsal výtečný Bodá. Tedy, teď už se musím k něčemu přiznat. Vůbec neznám jazyk esperanto. Divné, že? Já, nadšený přívrženec esperantského hnutí, nerozumím esperantu, a co je ještě podivnější, vezmeme-li v úvahu, že naučit se esperantu je možno v několika dnech - omluvit se mohu jen tím, že právě nadšená propagační činnost a účast v diskusích o tom mě zaměstnaly natolik, že jsem už neměl čas naučit se samotnému jazyku.

No ale nevádí, myslel jsem si, že přece číst esperantská písmena je tak snadné a logické, že budu moci odvážně číst nahlas jakýkoli text, který budu mít před sebou. Nikdo nepozná podvod.

Hned jsem vstoupil na pódium a začal číst povídku.

Nikdy jsem neměl podivnější zážitek. Ani jednomu slovu z textu, který jsem četl, jsem nerozuměl. Mlhavě jsem si pamatoval obsah povídky - či lépe řečeno jsem si myslel, že si jej pamatuji. Až doprostředka jsem si myslel, že čtu veselou povídku, a proto jsem četl ležérním a veselým hlasem. Avšak nikdo se nesmál. Všichni mě poslouchali vážně a dojatě. Několik přítomných pohybovalo hlavou, na druhé straně publika kdosi vzal kapesník a zakryl si s ním oči. Z jiné tváře jsem mohl číst jakoby výčitku (pochopitelně maďarsky, protože tváře mám ve zvyku číst pořád jen maďarsky) pro můj cynický a drzý způsob projevu.

Tu mi celá věc začala být podezřelá, kradmo jsem vrhl pohled na název novely, a ke své obrovské hrůze jsem viděl, že čtu právě tu svou novelu, která má ten nejsmutnější námět.

Hned jsem změnil hlas: pokračoval jsem pohřebním pomalým tónem ve čtení.

Na mou duši!

V první řadě se někdo ušklíbl, někteří se smáli nahlas.

Pot se mi usadil na čele. Teď jsem opravdu nevěděl, jak se věc má. Představte si hluchého virtuosa, který neslyší svou hudbu!

Na konci jedné věty začali tleskat. Okamžitě jsem ukončil čtení, vstal a uklonil se, jako když někdo skončí přednes s úspěšnou bravurou!

Všichni mi blahopřáli, fakticky mě oslavovali s tím, že prý jsem geniální přednášeč.

Když jsem se skromně znovu posadil na své místo a podíval se do knihy esperantské antologie, kterou jsem měl dosud otevřenou v ruce, v tu chvíli jsem pochopil, že v onom zmíněném okamžiku jsem v rozpacích obrátil dva listy, a místo své smutné novely jsem četl konec úspěšné humoresky Ference Molnára.

Frigyes Karinthy (1887 - 1938), významný maďarský prozaik, ironik a humorista. V letech 1935 - 38 byl předsedou Svazu maďarských esperantistů. Uvedená povídka byla uveřejněna poprvé v deníku „Pesti Napló“ v roce 1931, do češtiny přeložena z esperantského překladu M. Fejese v Hungara Vivo 1/1975. -jpa-

K. Havlíček Borovský

Král Lávra

Byltě jednou jeden
starý dobrý král,
ale to je dávno,
taky od Čech dál,
troje moře, devatery hory
dělí kraj ten od české komory,
kde on panoval.

Bylt' král irský Lávra,
povím zkrátka vám,
a já o tom králi
pěknou píseň znám;
nalej, stará, čerstvého do číše
a vy, kluci, poslouchejte tiše,
já ji zazpívám.

Posud krále Lávru
chválí irský lid,
nebyl ani tyran,
nebyl taky žid,
nenabíjel cizím svoji kasu,
rekratýrkou nesušoval chasu,
nedal chudé dřít.

Jenom jednu slabost
ten král dobrý měl,
že jest na holiče
tuze zanevřel,
dal se holit jenom jednou v roce,
vlasy dlouhé na krku široce
nosil jak roj včel.

Horší ještě bylo:
vždy na letnice,
jak očistil holič

Karel Havlíček Borovský

Reĝo Lavra

Vivis reĝo maljunulo,
inda je estimo,
sed ĝi estis antaŭ tempo
kaj ne en proksimo;
naŭ montaroj kaj tri oceanoj
kuŝis inter liaj civitanoj
kaj la ĉeĥa limo.

Estis Lavra el Irlanda
reĝa dinastio.
Kaj pri tiu reĝo
estas bela historio.
Hej, edzino! Vinon al mi portu!
Kaj vi, buboj, eĉ ne pepe vortu!
Kantos mi pri tio.

Irlandanoj portas Lavran
ĝis nun en la koro:
nek al Judo li similis,
nek al diktatoro,
nek fremdaĵon kiel sian traktis,
nek rekrutojn por milito kaptis,
justis al popolo.

Tamen unu mankon
havis la monarko brila:
ke malamis li la majstrojn
de la art' razila.
Foje nur en jar' sin razi lasis;
abel-svarme sur la kol'
amasis la hararo vila.

Eĉ pli mise! Ĉiujare
antaŭ Pentekosto,
kiam la barbir' glatigis

K. Havlíček Borovský

Reĝo Lavro

Foje vivis reĝo -
aĝa jam person' -
malproksime de la
ĉeĥa region',
kie li malantaŭ naŭ montaroj
de Ĉeĥland' kaj ankaŭ post tri maroj
sidis sur la tron'.

Li nomiĝis Lavro,
reĝo de Irland',
kaj pri tiu reĝo
estas bela kant'.
Vi aŭskultu, buboj kaj edzino,
mi, trinkante nun da freŝa vino,
kantos pri l' regant'.

Ĉiam Lavron laŭdas
ĉiu irlandan',
estis li nek judo,
estis nek tiran',
li per fremda mon' ne ŝtopis kason,
kontraŭ priŝtelad' povrul-amason
ŝirmis lia man'.

Nur pri sola manko
lia kuris fam' -
al razistoj lia
stranga jen malam':
ke nur unufoje ĉiun jaron
li ordonis razi barbhararon,
ege longanjam.

Post razad' de l' reĝo -
ĉiam je maj-fin' -
ĝenis la raziston

královské líce,
čekala jej divná odplata,
nic na stříbře, ale skrze kata,
to šibenice!

Divili se lidé,
mrzela je dost
na tom dobrém králi
tato ukrutnost;
však co král chce, zdrávot' pro
 poddané,

tak po letech zvykli si Irčané
na tu podivnost.
Jenom holičové
zvyknout nemohli,
na šibenici je
špatné pohodlí,
než co dělat? Nic jim nezbývalo
leda trpět, neb jich bylo málo
na rebelii.

Každý rok, když táhlo
již na letnice,
sebral se bradýřský
cech do radnice:
tam chudáci smutně los metali,
komu padne holit bradu králi
a - šibenice.

Padl los, ach, padl:
letos Kukulín
bude holit krále,
staré vdovy syn;
jak to stará vdova uslyšela,
omdlévala ustrašená celá:
„Ach, můj Kukulín!”

Již posloužil králi,
již ho vede kat,
ukrutnou odměnu
za tu službu brát:
tu se matka skrze zástup tlačí,
spěchá, co jí staré síly stačí,
zaň orodovat.

„Králi, pane králi!
Syn můj jedinej,
pro Boha tě prosím,
slitování měj!
Co si počnu, já ubohá vdova,
raděj sama umřít jsem hotova,
jen mi syna dej!

Králi, milost pane!
Máš to lidský cit?
Nevinného hochu
katem utratit?
Muž můj padnul v službě tvého
dvoru
a ty chceš mou jedinkou podporu
hanebně mi vzít? -
Jestliže ty, králi,
dobré srdce máš,

vangojn de la Moŝto,
stranga rekompenco lin atendis:
ne arĝento, sed li tuj ekpendis
sur strangola fosto.

Ne komprenis la konduton
la popol' irlanda,
eĉ indignis kontraŭ Reĝo
pro l' manio sanga.
Sed reĝ-volo sana al popolo!
Oni kontentiĝis do pri l' moro
kaj kutimo stranga.

Nur barbiroj ne kontentis
pri l' dirita sorto;
sur la hoko oni pendas
iel sen komforto...
Sed ribeli? Tro malmultaj estis
la barbiroj, sekve ne protestis
eĉ per unu vorto.

Kiam venis Pentekosto
sen kompat' kaj mildo,
en urbdomo kolektiĝis
la barbira gildo
kaj la loton tiris laŭ la vico,
kiun trafos reĝa raz-ofico
kaj - la pendumil' do...

Jes, ĝi trafis... Tiujare
juna Kukulino
devas reĝan barbon razi,
filo de vidvino.
Ŝi aŭdinte tion, tuj ekpalis
kaj sur teron kvazaŭ morta falis:
„Fil' de mia sino!”

Jam la Reĝon li priservis,
jam sub ligna trabo
hombuĉisto al li pagas:
ŝnuron el kanabo.
Jen patrino tra l' amas' kubutas,
kie oni filon ekzekutas,
peti por la knabo:

„Reĝo! Mia sola filo!...
volu lin indulgi!
Mi pro Dio vin petegas,
ne ŝajnigu surdi!
Mi, vidvino, ploras malespere
kaj mi ankaŭ mortus mem prefere,
ol lin lasi murdi.

Reĝo nia, Reĝa Moŝto,
estas ĝi humano,
ke senkulpa knabo
mortos per buĉista mano?
Mia edzo falis por vin servi,
fil' min nutras... Nun pereas per vi
ankaŭ li, infano.

Estas vi ja bona reĝo
al civitanaro,

tia ĉi destin':
stranga rekompenco lin atendis -
oni lin al pendigilo sendis
por pendigi lin.

Miris ĉiuj homoj,
miris kun ĉagren' -
ĉe la bona reĝo
tiu abomen!
Tamen reĝon la popol' estimas
kaj Irland' pri tio jam kutimas
eĉ pri l' malkonven'.

Nur razistoj plendis
pro kruela sort',
ĉiu pendigilo
estas sen komfort';
kion fari? Ja al ili restis
suferado nur, ĉar ili estis
por rebel' sen fort'.

Post printempo ĉiu
la razista band'
venis urbodomon
trakti pri l' demand',
kiu mizerul' lotilon levos,
kiu reĝon razos kaj tuj devos
pendi desur banĉ'.

Ho, lotilon levis
juna Kukulino',
razos sian reĝon
filo de vidvin';
kiam tion la vidvin' eksciis,
ŝi svenadis kaj timplene kriis:
„Mia Kukulino!”

Jam li servis reĝon,
jam kondukas lin
la ekzekutisto
por la vivofin':
la patrino kuras kun rapido,
kuras al la reĝ' pro sia ido
la propetantin'.

„Reĝo, nia reĝo,
mia sola fil',
ne forsendu lin
al la pendigil!
Kia estos nun eĉ mia sorto?
kaj por via moŝto lia morto
estos sen util'!

Reĝo, ĉu vi scias,
kio estas sent'?
Lia morto estos
por mi mu turment'.
Mia edzo falis por la korto,
nun la filon sendas vi al morto
malgraŭ mia plend'! -

Se en via brusto

jistě každoročně
jednou blázniváš:
pro nic za nic, pro královské vousy
kat člověka bez viny zardousí,
to jsi otec náš?“ -

Král se na ty řeči
velmi zastyděl,
ale ještě více
slitování měl,
nezlobil se, vzdychnul jen
hluboko,
dobré srdce tisklo slzu v oko,
zastavit velel.

Všem se kázal vzdálit,
jen sám Kukulín
povolán ku králi,
bledý jako stín;
král tu sedí, na klíně korunu:
„Přístup, synku, blíže sem ke trůnu
i pod baldachýn.

Přísahej, že smlčíš
na věčné časy,
co jsi na mé hlavě
viděl pod vlasy,
pak se tobě neublíží v ničem
a ty budeš mým dvorním holičem
po všechny časy.“

Rád přísahal mladík
a byl propuštěn
zvěstovati matce,
jak jest povýšen;
pak holíval ob den králi líce
a již žádný holič na letnice
nebyval věšen.

Těšili se lidé,
že ten dobrý král
jedinkou svou chybu
vymluvit si dal;
více však než celý národ irský
počestný cech holičsko-bradýřský
si to liboval. - -

Stojí mladý holič
v dvorském obroku,
raduje se matka
z toho pokroku,
jasné hvězdy na fraku se třpytí,
zlaté porty, vyšívané kvítí,
břítva po boku.

Než co platí hvězdy,
zlaté třepení,
když srdéčko trápí
ostré hryzení:
nevyjevit nic po věčné časy,
co vidívá na králi pod vlasy
vždy při holení!
(Dokončení příště)

tamen certe vi frenezas
foje en la jaro.
Reĝa barbo! Neniaĵo tute!
Kaj pro ĝi strangoli ekzekute
estas patra faro?“

Kaj la Reĝo? Hontigite
kapon li mallevis,
ja eĉ pli: en lia horo
kvazaŭ io krevis.
Li suspiris, ne koleris pri ŝi,
nur rapididis siajn larmojn visi,
oni halti devis.

Ĉiujn homojn li forsendis,
restis ĉe la Reĝo
sole juna Kukulino,
pala kiel neĝo.
Lavra sidas kun la kron' sursine:
„Venu, knabo, al mi pli proksime
ĝis la ora seĝo.

Ĵuru al mi, ke neniam
volas vi perfidi,
kion sub la reĝaj haroj
devis vi ekvidi.
Tiam vin plu ne minacas ĝeno,
sed vi en la Kort-Barbir-Posteno
povos ĉiam sidi.“

La junulo tre volonte
al la Reĝo ĵuris
kaj libera al patrino
kun avanco kuris.
Do la Reĝon li razadis poste.
La barbiroj ne plu Pentekoste
pendumil' teruris.

La Irlandaj civitanoj
sentis koran dankon,
ke la bona Reĝ' formetis
sian solan mankon.
Tamen pli ol ĉiuj, kun jubilo
la honestaj majstroj de razilo
laŭdis la reganton.

En posten' de kortegano
la junulo pavas,
la patrino lin admiras:
Ho, kiel li bravas!
Stelojn, orbrodajon sur livreo kun
galonoj, kaj sur portepeo li razilon
havas.

Ve! La stelojn kaj orfranĝojn
li ne plu avidas,
ĉar, se koron mordas vermo,
koro invalidas:
Ne perfidi eĉ nur per rimarko,
kion dum razad' li ĉe l' monarko
sub la haroj vidas!
(Finota)
Tradukis Tomáš Pumpr, 1960

batas bona kor",
certe vi suferas
pro frenez', sinjor':
pro nenio, pro reĝbarbo taŭza
la razistojn trafas pun' senkaŭza -
tia jen teror!"

El la brust' de l' reĝo
sonas honta ĝem',
sed li havis certe
pli da kompatem':
ne koleris li kaj sen disputo
li kun larm', ke ĉesu ekzekuto,
tuj ordonis mem.

Ĉiujn forvenigis li,
sole Kukulin'
timas nur pri sia
nun antaŭdestin',
sidas la regant', sur sin' kun krono:
„Venu, filo, venu ĝis la trono
kaj ne ĝenu vin.
Vi ne diskonigu,
ĵuru, mia knab',
kio estas stranga
sub la reĝa ĉap'!
Se vi lasos ĝin en silentkaŝo,
vin neniam plu minacos maŝo
pro la reĝa kap'!“
Jam razisto reĝa —
ĵuris Kukulin',
kun plezur' sciigis
ĝin al la patrino.
Kukulino venadis al la korto,
razis Lavron; penso pri pendmorto
ne plu ĝenis lin.

Pro la bona reĝo
ĝojis la popol' -
sola mank' forestas
dank' al lia vol':
ĉiuj ŝatis lin pro lia mildo,
sed precipe por la razistgildo
estis ĝi konsol'. - -

Servis Kukulino
en la nova rang',
havas la patrino
ridon sur la vang':
sur la frako brilas stelo ora,
ora borderaĵ', brodajo flora
kaj razil' je flank'.

Kion luks' validas
kaj survesta or',
se turmento akra
estas en la kor',
pri la reĝa kapo la sekreto
devas konserviĝi kun diskreto -
kia kordolor!
(Finota)
Tradukis Jaroslav Mráz, 1991

Esperanto en la Radio

Pola Radio, Varsovio (Radio Polonia)

elsendas en Esperanto ĉiutage

15.³⁰-15.⁵⁵ 7285, 7275 kHz (41 m)

kaj ripetas la programon

20.⁰⁰-20.²⁵ 7130 kHz (42 m)

kaj per la satelito

21.⁰⁰-21.³⁰ kaj 10.³⁰- 11.⁰⁰

Eutelsat IIF6 13E (Hot Bird), 11.476 GHz

Hpol (TV Polonia), 7,38 MHz

<http://www.wm.org/ondemand/poland.html/>

http://www.radio.com.pl/polonia/esperanto_eo

Ĉina Rádío Internacia, Pekino

elsendas en Esperanto por Eŭropo ĉiutage

21.⁰⁰-21.³⁰ 9965,7265,7110 kHz (30,41,42 m)

<http://www.cri.com.cn/>

Radio Aŭstria Internacia, Vieno

elsendas en Esperanto semajnan programon

lunde 21.⁰⁴-21.³⁰ 6155, 5945 kHz(49m)

vendrede 20.⁰⁰ - 20.³⁰ 1476 kHz (203 m)

sabate + dimanĉe 22.⁰⁵ - 22.³⁰ 6155, 5945 kHz (49 m)

satelite: Astra 19.2 E, 11.141 GHz Hpol (kanalo 45, Bayem 3), 8.10 MHz,

per Astra Diĝita Radio (ADR)

Astra 19.2 E, 12.692 GHz Hpol, en ORF-DVB-Bouquet, SR 22.000, FEC 5/6 APID 173

<http://roi.orf.at/esperanto>

Radio Vatikana

elsendas en Esperanto *dimanĉe kaj festotage*

21.²⁰- 21.³⁰ 527,1530,4005,5880 kHz (569, 196, 75, 51 m) kaj ripetas la programon

23.⁵⁰- 24.⁰⁰ per la samaj frekvencoj

merkrede kaj ĵaŭde 21.²⁰ -21.³⁰ 1611, 7250, 9645 kHz (186, 41, 31 m)

http://www.vatican.va/news_services/radio

Itala Radio Internacia, Romo

elsendas en Esperanto *ĉiusabate*

21.⁰⁰ - 21.²⁰ 5960, 7290 kHz (50, 41 m)

Eutelsat II F6 13E (Hot Bird), 11.446 GHz Vpol (Rai Due), 7.56 MHz

<http://www.intemational.rai.it/radio/index.htm>

<http://www.intemational.rai.it/radio/radio.htm>

BULTENO

de Esperantista Klubo en Praha

Věstník Klubu esperantistů v Praze

Redaktor: Jiří Patera

Odesilatel:

Klub esperantistů v Praze

C/o Jindřich Ondráček

Bubenská 17

170 00 Praha 7